



ESPERO KATOLIKA

LA NEKONATA DIO.

Kiam la apostolo Paŭlo venis al Ateno por prediki la evangelion en tiu ĉi centro de la greka kulturo, li trovis tie altaron kun la stranga surskribo: „Al nekonata dio”. Tia nekonata dio, aŭ pli bone dirite, tia nekonata persono en la Sankta Triunuo estas ankaŭ por tro multaj katolikoj la Sankta Spirito. Kaj ni bezonus en la multnombraj mizeroj kaj danĝeroj de la nuna tempo ĝuste lian helpon pli urĝe ol ion alian!

Li, la Spirito de la saĝeco, prudento kaj konsilo, li sola povas lumigi nian spiriton kaj montri al ni en ĉiu ajn situacio, kion ni faru.

Li, la Spirito de la forteco, sola povas doni al ni la kapablon persisti brave eĉ sub plej fortaj batoj.

Li, la Spirito de la amo, sola povas ekflamigi en niaj koroj tiun egan fajron de la amo, kiu estas necesa, por reunuigi kaj kunfandi ĉion disigitan.

Li, la granda konsolanto, sola povas doni al ni tiun konsolon, kiun ni serĉis tiom ofte kaj vane ĉe homoj, kiuj estas tute same malfortaj kaj senhelpaj kiel ni mem.

Li, kiu okaze de la unua pentekosto transformis kelkajn simplajn, senkonsilajn kaj timemajn virojn en konfesantojn kaj martirojn, en heroojn, kiuj plensukcese ekbatalis kontraŭ la mondreganta paganismo kaj inaŭguris novan mondepokon, tiu Sankta Spirito sola povas ankaŭ el niaj vicoj estigi virojn, kiuj kapablas montri al ni la ĝustan vojon en pli bonan kaj pli belan estontecon.

Do, la Sankta Spirito ne nur estas iu ajn donaco de la ĉielo, li estas pli vere la plej bona, plej ĉefa, plej altvalora, ja, la ununura efektive necesa donaco, kiun bezonegas la homaro speciale en la malordo de nia tempo.

El la Sankta Skribo ni scias, ke ni nepre ricevos tiun ĉi miraklan donacon, se ni nur konfidoplene petegas je ĝi. Kristo mem promesis tion al ni, dirante: „Se nun vi, kiuj vi estas malbonaj, scias doni bonajn donacojn al viaj infanoj, kiom pli donos la Ĉiela Patro la Sanktan Spiriton al tiuj, kiuj Lin petas de li! (Luko 11, 13.) Ĉar ni nepre ricevos la Sanktan Spiriton, se ni petegas Lin, ni do uzu nian „ĉiopovon”, kiel prave nomiĝas la preĝo. Ni fine uzu tiun nian potencon, kiu estas multe pli forta ol ĉiuj potencoj kune de la mondo kaj de la infero. Ni uzu tiun nian potencegon, kiu eĉ kapablas devigi surteren la Spiriton de Dio, se estas permesata tiu ĉi esprimo. La malbonaj spiritoj, kiuj nuntempe regas la homaron povas esti forpelataj nek per atombomboj, nek per brigadoj de kirasveturiloj, sed nur per preĝado kaj fastado.

La konferencoj, en kiuj la granduloj de ĉi tiu mondo interkonsiliĝas pri nia estonta sorto, kutime jam estas finitaj, antaŭ ol ili efektive komenciĝis. Tio vere ne estas miriga. La provo, heligi per la lumeto de nura homa saĝeco la nepenetreblan mallumon, kovrantan nuntempe la mondon, estas ja tute senŝanca entrepreno. Ankaŭ la provo, ordigi nur per la malvasthorizonta homa intelekto la ĥaoson de la hodiaŭaj mondproblemoj, estas same entrepreno, kondamnita jam dekomence al malsukceso. La plej karakterizaj signoj de la nuna tempo estas senkonsolo kaj malespero, plie premanta timo pro eble minacantaj teruraj okazantaĵoj, kaj fine la ekkono, ke ĝisfunda novordo de la homa societo iĝis nepre

necesa, dum oni ne scias, kiamaniere ĝi efektiviĝu kaj de kie oni prenu la fortojn kaj rimedojn por tiu ĉi giganta entrepreno. Unuvorte, la homaro alvenis je la fino de sia latino.

Sed eĉ sub tiuj ĉi malesperigaj cirkonstancoj ni povas alten teni nian kapon, ĉar ja super la tuta ĥaoso nuntempa vivas Potenculo, kiu firme tenas la bridojn de la mondregado. Tiu ĉi potenculo estas la Sankta Spirito, kiu sola povas helpi al ni en niaj mizeroj, kiu ankaŭ certege helpos, se ni nur konfidoplene petas kaj petegas. Li jam delonge estus helpinta, Li jam delonge estus doninta al ni tiujn fortojn, kiujn ni bezonas por renovigi la vizaĝon de la tero, se Li ne estus estinta por ni ĝis hodiaŭ „la nekonata dio”.

D-ro. Karl Friedl

*

LA MEDICINA HISTORIO DE LOURDES — IX.

Ĉu tiu kaŭzo estus la nekonataj fortoj de la Naturo? — Jen estas kontraŭparolo aŭ supozo kiu ŝajnas grandega, fortega. Evidente la kuracistoj, la scienculoj, la kleruloj, la arogantaj liberpensantoj, kiuj absolute volas klarigi, certigi, pruvi, ke la resaniĝoj de Lourdes estas faritaj per naturaj kaŭzoj, alvokas la nekonatajn fortojn de la Naturo. Ili obstinegas pri sia opinio, tamen ili pruvas nenion. Ili nur certigas, Ili estas memkontentaj, sin estimante ŝirmitaj kontraŭ iu ajn atako, malantaŭ tiu premega argumento. Sed tiu klarigo ne estas scienca, ĉar ne povas esti pruvata. Ne nur oni devas firme certigi, sed ankaŭ klare pruvi....

Ni rezonu „saĝe”: Ni supozu dum kelkaj minutoj, vera, la realecon de tiuj eksterordinaregaj, nekonataj fortoj, kiuj aperas, aperadas, nur en Lourdes, aŭ aliloke, tamen en rilato kun Lourdes. Tio estas stranga, tre stranga. Kaj krome tiuj fortoj aperas ekzakte depost Februaro 1858, do depost la „Aperoj” de iu Estulo, iu Sinjorino, al Bernadette, en la Groto de Massabielle, ĉe Lourdes. Tio estas ankoraŭ pli stranga. Kaj aliflanke tiuj misteraj fortoj estas kapricemaj: ili ekaperas de tempo al tempo, sen antaŭsignoj, sen antaŭsimptomoj. Ili resanigas nur malsanulon, tie kaj tie ĉi. Ili resanigas malsanojn tute malsimilajn, kaj tio: subite, iun ĉiam mistere, neantaŭvideble. Vere estas kurioze, rimarkinde interese! Kial ĉi tiuj fortoj havas komencon? Ĉu ili havos, eble, finon?

Sed, ni pliprofundigu la problemon. Ĉiuj kiuj asertas la ekzistadon de nekonataj fortoj de la Naturo, logike devas samopinii kiel ni, kuracistoj kredantaj, pri la rezonado sekvanta: La normaj fortoj de la Naturo, konataj aŭ nekonataj, estas aŭ devas esti: absolutaj, universalaj, senŝanĝaj, senfinaj. Ĉiuj fortoj, ĉiuj leĝoj de la Naturo estas karakterizataj per: ĝeneraleco, universaleco, ĉiameco. Nu, la pretenditaj nekonataj fortoj de la Naturo havas NENIUN el tiuj karakteroj, ĉar ili estas: privataj, lokalizataj, ŝanĝemaj, intermitaj. Estas do necese konkludi, ke ili ne ekzistas.

Kion la aprobantoj de la nekonataj fortoj de la Naturo opinias pri tio? Sed, tamen, tiuj fortoj estas pruvitaj de la resaniĝoj eksterordinaraj de organikaj malsanoj, de anatomiaj lezoj de malsanuloj venintaj en Lourdes kun religiaj, katolikaj pilgrimoj; aŭ de malsanuloj resaniĝintaj ekstere de Lourdes, sed sekve de agoj religiaj similaj. Tio iĝas pasiiga. Tiuj faktoj estas neneigeblaj. Tio estas spiritkunfuzanta por iu spritulo vere scienca, entuziasmiĝinta pri la esplorado de la Scienca Vereco... La naturaj leĝoj, kiuj regas la homan organismon, estas biologiaj leĝoj, kiel ĉiuj naturaj leĝoj, estas neŝanĝeblaj pri siaj funkciadoj. Ili estis, estas kaj estos ĉiam samaj. Pretenditaj nekonataj biologiaj leĝoj ne povus detrui la ĉeestantajn konatajn biologiajn leĝojn. Ĉar la Naturo ne povas sin mem detrui, nek sin kontraŭdiri. Neniam oni povos eltrovi biologiajn leĝojn „novajn”, kiuj permesos ke sesmonata

infaneto fariĝus, subite, junulo dudekjara. Neniam oni povos eltrovi Naturfortojn kiuj ekstermos, momente, kaj lasante neniun postsignon, kaj sen ia sanigaĵo, sen ia kuracilo, la lezojn de tuberkula periteneito, la lezojn de kankra tumor, ktp. Tiu hipotezo pri la nekonataj fortoj de la Naturo, senmotiva kaj kontraŭa al la simpla saĝo, kondukas al jenaj demandoj:

Se tiuj nekonataj fortoj estas naturfortoj, malgraŭ ke „nekonataj”, kial ili ne resanigis malsanulojn en Lourdes antaŭ 1858? Kial ili atendis tiun daton por ekaperi? Ĉu ili ricevis en tiu epoko la ordonon efiki? Kiu estus doninta tiun ordonon al ili? Kial ili estus obeintaj tiun ordonon? Kial — de post unu jarcento — ili estas resanigintaj nur iujn malsanulojn, kaj ne ĉiujn kiuj venis al Lourdes? Oni neniam trovos pure sciencajn respondojn al tiuj demandoj. La adeptoj, la aprobantoj, la sampartianoj de la „nekonataj naturfortoj” ne povas respondi kion ajn, el vidpunkto scienca. Ili nur asertas ke tiuj nekonataj fortoj ekzistas. Estas vere malmulte! Tiu respondo ne estas scienca respondo. Sed, en tiu okazo, mi ankoraŭ diros:

„Sinjoroj, se vi certigas ke la resaniĝoj de Lourdes estas fakto de nekonataj naturfortoj, vi efektive pruvas: ke la „Aperoj” okazis, en la Groto, en 1858; ke la Sankta Virgulino ekzistas, same kiel la Dia Supernaturo; do ke DIO estas la kaŭzo de tiuj resaniĝoj. Vi klarigos, tuj, sen diskutado, la kaŭzon de ĉiuj veraj resaniĝoj de Lourdes. Via karega hipotezo kiu pretendas ke la nekonataj fortoj de la Naturo estas la certa kaŭzo de la „Mirakloj de Lourdes” kondukas, laŭ absoluta logiko, al tiu konkludo... iom neatendita?”

Oni konstatas sciencajn kaj supernaturajn faktojn. Do, ili ne povas esti estigitaj per natura kaŭzo: la Aŭtoro de la Naturo, sola, povas fari esceptojn en ĝiaj leĝoj, kie kaj kiam Li volas. Tiu rezono ne ŝajnas tiu de iuj malkleruloj, de iuj stultuloj: ĝi starigas sian logikon kaj sian fortecon kontraŭ la kontraŭuloj de la Dia Supernaturo.

Dum longa tempo la malestimantoj de Lourdes, ne sciante kiel kompreni kaj komprenigi la eksterordinarajn resaniĝojn, trovas pli facile moki la kuracistojn kiuj vidis tiujn resaniĝojn, kiuj interesiĝis pri ili. Sed la tempo de la mokaĵoj, de la ŝercoj, de la ofendaj paroloj, de la ridindaj kaj stultegaj kontraŭdiraĵoj, de la senenhavaj retorikaĵoj, de la pompaj sed nesciencaj priparoladoj, de la malklaraj kaj malprecizaj babiladoj, tiu tempo pasis. La intelektuloj multe ŝatas tiujn faktojn de Lourdes, la medicinaj medioj konsideras ilin. Oni povas diri ke tiuj faktoj devige altiris la atenton de la scienco, de la vera scienco, ĉar ili estas sciencaj, medicinaj faktoj. Estas do logike ke la scienculoj lernas, studas, esploras tiujn strangajn kaj kuriozajn resaniĝojn maloftajn. Tio estas tiel vera ke — atente aŭskultu! — en majo 1938, D-ro Le Bec, eksprezidanto de la Oficejo de la Konstatoj, eksĥirurgiisto de la Hospitalo Sta. Joseph, en Parizo estis invitata de la Granda Loĝio de Francujo, por fari instruan paroladon pri la mirakloj de Lourdes. La priparolado okazis. Ĉiuj Framasonoj estis respektaj. Kontraŭdiraĵoj estis prezentataj kun ĝentileco, kaj pulvorigataj. Iu malgranda fakto, pli surpriza, pli mirinda, okazis ankoraŭ en la pasinta tempo: Tre fanfaronaj malpiuloj petis eksperimentan miraklon; ili deziris ke iu delegacio de kleruloj estu elektata; ke ĝi elektu malsanulon kaj submetu lin al la bonvolemo de Dio... en Lourdes, de tiu Dio kies ekzistadon ili neas: lukse bela ekzemplo de mallogiko! Ni ridetu, ĉar koleradi kontraŭ ili estus kruela. Ni preĝu sanktan Kolombanon, patronon de la Stultuloj, ke li bonvolu pririgardi ilin....

(Daŭrigota) D-ro Paul Léger.

*

AŬTUNA PRIPENSADO.

Teren, multkolora, falis l'arbofolioj...
Teren, putriĝintaj, falis: kaj la fruktoj
Teren, vermotruaj, falis, sen dolĉeco...
Teren, mortigita, falis la beleco
De la floroj..

Peze kuŝas sur la mondo malĝojeca,
Kvazaŭ tomba, ĉar senvive defalinta,
Neesteco: ĉu ĝi estas malespero?
Ĉu ĝi estas neniiga nepre morto
De la koroj?..

Terenfalís kaj forsvenis
Ĉia ĉarma kaj plena,
Gaja vivo.. kaj disiĝis
Ĉiu bruo junecfreŝa
De la ludoj..

Kaj forflugis, ho, foregen,
La freneza, la brilanta,
Kiu ravis nin ĉielen,
Voĉ', nun estingita,
De la kantoj..

En nebula kaj malseka
Aer' plu ne flugas birdoj..
Kien iris, najtingala
Fluto, vi, kaj gajaj triloj
De l' alaŭdoj?..

*

Terenfalís kaj foriris
Ŝajne nur, la ĝoj', la kanto..
Ŝajne nur esper' nin lasis..
Ĉar ekbrilas nova Stelo
Tra la nuboj..

Nova Stelo, jen, tralumas
Ridetanta, promesfulma,
Kaj graveda je feliĉa
Estontaĵo.. Ĝi ridetas
Tra l' mallumoj..

Malĝojeco? Ne: ĉar kantas
Nova gaje, kaj eksaltas,
Melodio:

Stel', ekbriligita antaŭ,
Ho, tre longe, kiam ŝajne
Tute svenis ĉio, preskaŭ
Ŝajne, mortis ĉio — ĉu ne? —
Tra l'jarcentoj..

Radianca!.. Ni ĝin nomas:
„Dipromeso, Homespero”,
Jen ĝi vokas kaj kondukas
Ĉe l' Savonto de l'Homaro,
Tra l'Dezerto,

Vokas kaj kondukas virojn
Tri... El Oriento.. Etan
Ili serĉas knabon ..Donojn
Kunportante por l'Infan',
Tra l' Judlando.

Ili iras, ĝis la Stalo,
Kie kuŝas, en manĝuja
Lito, sur malmulta pajlo,
Knabo Dia.. Jen Maria,
La Patrino..

*

Ho! Jesuo, ho! Knabeto!
Vi, la Sun' eterne brila,
Vi, l'Esper' kaj la Karito,
Vi, la Savo.. Vi, humila
Difileto!

*

Falis teren la folioj?
Eksilentis ĉiuj kantoj
De la koro?..

Terenfalís? — Teren saltis
La Promeso!.. Kaj nin levis
Al Espero

Nia Dio — ĉar nin amas..
Nepra Morto? Ho, ne: vivas
Nun la Vivo!..

„Glor' al Di' en la plejalta,
Pac' sur ter' al la Homaro!”
Estu tio!

P. Louis Steinmetz, Metz (Francujo).

*

NOVAJ REPRESENTANTOJ (anstataŭ sur la kovrilo nomitaj)

Hispanujo: f-ino Maria Casasnovas, Calle Arcedianos 1, ZARAGOZA.

Usono: s-ro Henri Soudée, 2535 Belmont Road NW. WASHINGTON DC 8.

LA XXXVIa INTERNACIA EŬKARISTIA KONGRESO EN RIO DE JANEIRO.

Krom la intereso por niaj religio kaj movado, la partopreno en la venonta Eŭkaristia Kongreso ebligas al la kongresantoj koni la plej grandan kaj progreseman landon de Sud-Ameriko kiu estas Brazilo, kaj ĝian belegan ĉefurbon Rio-de-Janeiro. La vasteco de ĝia teritorio, la diverseco de ĝia klimato, la riĉeco de ĝiaj produktoj, kaj preskaŭ sesdek milionoj de ĝiaj loĝantoj, pacamaj kaj Di-timaj, igas Brazilon tre valora ne nur en Sud-Ameriko sed ankaŭ en la mondo. Ĝia influo ekonomia, politika kaj kultura estas sufiĉe grava kaj granda en internacia rilato. Laŭ la religia vidpunkto, Brazilo estas konsiderata kiel lando kie vivas pli multaj Katolikoj ol en alia lando. Kvankam la Eklezio kaj la Ŝtato havas memstaran kaj apartan vivon, la Eklezio tamen ĝuas tie ĉi plenan liberecon por ekzerci siajn funkciojn. La Ekleziaj aŭtoritatoj estas respektataj kaj obeataj. Brazilo nun havas 20 ĉef-eparĥiojn, 66 eparĥiojn, 29 sendependajn Prelatejojn, kaj estas honorata per tri Kardinaloj; ĝia pastraro konsistas el 7000 sacerdotoj. La Katolika Agado kun ĝiaj diversaj branĉoj estas organizata kaj bone progresas. La katolikaj lernejoj priosperas. La seminaroj konstante multiĝas en diversaj partoj de la lando. Rio-de-Janeiro, la sidejo de venonta Kongreso, estas granda urbo kun preskaŭ tri milionoj da loĝantoj. Ĝi prezentas belegan pejzaĝon, rezultantan el la kunesto de la maro, montetoj, valoj, kaj arbaroj kun abundaj tropikaj kreskaĵoj kaj floroj. Multnombraj momumentoj en ĝiaj placoj, kaj diversspecaj publikaj kaj privataj konstruaĵoj, en bongusta stilo, havigas al ĝi la rajton esti unu el la plej modernaj kaj plej ĉarmaj ĉefurboj de la mondo.

La Esperanto-movado estas vigla en Brazilo, kies registaro favoras la uzon de nia lingvo. Niaj Brazilaj samideanoj fervore laboras por la disvastigo de Esperanto, kaj iliaj klopodoj rikoltas bonajn fruktojn; multaj el ili estas lertaj kaj kapablaj instruistoj, profesoroj kaj verkistoj. Ekzistas la nacia organizo kiu estas Brazila Esperanto-Ligo, kiu gvidas la movadon sur neŭtrala fundamento. Multaj katolikaj Esperantistoj ekpensas fondi baldaŭ Brazilian Katolikan Esperantistan Asocion por celi la disvastigon de Esperanto en la katolikaj medioj, kaj por reprezenti Brazilon en la internacia katolika movado de I.K.U.E. Kompreneble la projektata Asocio kunlaboros kun la Nacia Ligo, kiel socia membro, por la komuna intereso. En la kadro de la venonta Kongreso, okazos kvin altvaloraj ekspozicioj jenaj: 1) pri Religia Arto, 2) pri Misa Agado tutmonda, 3) pri Katolika Edukado kaj Instruado en Brazilo, 4) pri Organizoj de Katolika Bonfaro en Brazilo, kaj 5) pri Kateĥisma Instruado. Tiuj ĉi ekspozicioj sendube oferos novan allogon al la kongresanoj. Ankaŭ ni povos profiti la okazon por organizi Ekspozicion pri la Katolika Esperanto-Movado, kiu certe utilos por helpi la disvastigon de nia lingvo inter la kongresantoj venontaj el ĉiuj partoj de la globo. Oni opinias kaj esperas ke eble du milionoj da pilgrimantoj alvenos al Rio-de-Janeiro por ĉeesti la ekstraordinaran spektaklon kiun havigos la XXXVI-a Internacia Eŭkaristia Kongreso. Ni esperantistoj, nepre klopodu esti inter la pilgrimantoj por ke la Esperantista Sekcio en la Kongreso havu plenan sukceson.

*

I.K.I. X.

Ĉu IKI nepre estas necesa por la evoluo de nia katolika Esperanto-Movado? Sen IKI nia kara IKUE ciam restos nur ordinara bona unuiĝo, ne tiel multe diferenca de aliaj bonaj unuiĝoj. Kaj nun mi vidas kaj aŭdas vin murmuri, kaj vi ne trovas vortojn sufiĉe energiajn por esprimi vian indignon!

Atendu, vi ne miskomprenu min, precipe vi, estraranoj de nia ŝatata IKUE kaj vi ĉiuj kiuj tiel fervore praktikas Esperanton kaj batalas por ĝi. Neniu povas taksi pli alte ol mi vian grandegan laboron por nia movado, neniu pli forte ol mi sentas mian tiel grandan malsuperecon al vi, eminentuloj de nia Unuiĝo, neniu pli bone ol mi scias ke mi absolute ne kapablas fari vian laboron por IKUE. Kaj tamen... tiuj vortoj, malagrablaj, sed bedaŭrinde: veraj! Ĉar la eminentuloj de nekatolika Esp. unuiĝoj ne estas malpli fervoraj kaj tujagemaj; oni ne bezonas esti katolika por laboregi por la pacmovado de Esperanto! Kial tiom da katolikaj esperantistoj aniĝas al la nekatolikaj unuiĝoj? Kial tiom da ili vizitas la neŭtralajn internaciajn kongresojn anstataŭ la katolikajn? Kaj eĉ dum ili tamen estas anoj de IKUE! Kial tiom da katolikaj esperantistoj aĉetas, legas kaj plifaciligas la eldonon kaj disvastigon de esperantaĵoj, kiuj estas kontraŭ la katolika Religio kaj danĝeraj por koroj kaj moroj laŭ katolikaj normoj? Kaj... kial tiom el niaj pliaĝaj sacerdotoj malŝatas nian katolikan E-movadon? Kial tiom el niaj junaj sacerdotoj eĉ nenion scias pri nia laboro kaj havas nur mokadon kaj malfidon? Se ni ne kapablas aliformi la al Katolika Esperantismo malfavoran opinion de niaj ankoraŭ nun rifuzemaj sacerdotoj, kvazaŭ ĝi estus nur ludaĵo, amatoraĵo, aŭ eĉ io danĝera, por kelkaj gejunuloj aŭ fanatikuloj, tiam mi certigas al vi ke ni neniam sukcesos kreskigi nian katolikan E-Unuiĝon ĝis vera Mondunuiĝo! Plurfoje mi spertis, parolinte aŭ korespondinte kun sacerdotoj, ĉu el Nederlando aŭ el Norvegio, el Hispanio aŭ el Mez-Afriko, ke, se ni sukcesis aŭskultigi ilin al mia klarigado pri IKI kaj ties laboro en Esperantio, mi ĉiam rimarkis veran surpriziĝon kaj honestan miron: „Sed tion mi tute ne sciis... Ĉu vere estas tia la katolika Esperantismo? Sed tiam ĝi havas sencon, tiam ĝi rajtas esti praktikata, tiel ĝi ne estas nur ludo, ne io danĝera, sed ĝi kondukas la animojn al Dio, la ununura celo de la vivo!”

Neniam plu okazu ke sacerdoto malpermesu al kovertinto pere de Esperanto, komuniki ke li, interrilatinto kun IKI, komencis pripensi kaj iom post iom, helpate de la informadoj de IKI kaj la preĝado de la E-istoj katolikaj, trovis la Pacon en la Vero!....

Estas nia tasko, (kaj eble vi ne opinias ĝin tiel grava kiel ĝi esence tamen estas!) neniigi tian mis- kaj malkomprenon ĉe tiuj, kiujn ni tiel kontraŭvole malhavas en niaj unuaj rangoj. Katolikaj Esperantistoj, atentu vian aferon!

E.H.

*

ESPERANTO ĈE LA EKS-STUDENTOJ DE SUPERAJ KOMERCAJ LERNEJOJ.

En Lyon, Francujo, okazis komence de Julio 1954 internacia kongreso de la Asocioj de Eks-Studentoj de Superaj Komercaj Lernejoj.

Unu el la punktoj de tiu programo estis la lingva demando. Du raportoj estis prezentataj: unu de Sro Nordqvist el Stockholmo, kiu proponis la uzadon de Esperanto, la alia de Sro Marchal, el Lieĝe, kiu sugestis la internacian uzadon de la angla lingvo. La diskutado montris, ke la partoprenantoj preskaŭ nenion scias pri Esperanto, kaj nutras kontraŭ ĝi la bonekonatajn antaŭjuĝojn.

Richard Levin, prezidanto de la Eks-Studentoj penis kontraŭbatali tiujn antaŭjuĝojn kaj fine sukcesis akceptigi, ke la demando estu plue studata kaj enskribata en la tagordo de la venonta kongreso, kiu okazos en 1956 en Romo (Italujo).

La Esp. Societoj, kiuj bonvolas helpi estas petataj informi Richard Levin 55, avenue Félix Faure, Lyon, (Rhône). Francujo.

NOMOJ DE SANKTULOJ EN ESPERANTO. VII

10. Nomoj je -is.

Ĉi tiu grupeto facile povas esperantiĝi ŝanĝante -is en -o:

Basilidis - Fidelis - Juvenalis - Paschalis - Vitalis.

Basilido - Fidelo - Juvenalo - Paskalo - Vitalo

11. Nomoj je -es.

Se temas pri la finaĵo -es, oni simple ŝanĝas tiun en -o:

Joannes - Johano ; Melchiades - Melkiado

Se -es tamen estas parto de la radiko, kio montriĝas en la genitiva formo -etis, oni konservas -es, aldonante -o :

Hermes - Hermeso.

Tiel jam proponis A. Dombrovski (E.K. 1905, 31) kaj poste la tri Komitatanoj (Of. Gaz. 221).

12. Nomoj je -x.

Temas nur pri kelkaj nomoj kaj la uzo de la nomo Felikso Zamenhof jam decidis la esperantigon. Tiel ankaŭ en Of. Gaz. troviĝas: Felikso, -ino (220).

Tiel estu ankaŭ: Audifax - Aŭdifakso.

13. Nomoj de Anĝeloj.

ĉar -el estas parto de la radiko oni simple aldonas -o:

Mikaelo - Gabrielo - Rafaelo.

14. Nomoj je -on kaj -or.

Ili ankaŭ akiras -o post -on kaj -or:

Abdono Hilariono Pantaleono Simeono Simono Trifono Naboro Viktoro.

15. Nomoj je -er.

En la finaĵo -er oni forlasas la -e kaj aldonas -o;

Alexander - Aleksandro ; Silvester - Silvestro.

Se -er apartenas al la radiko la -e restas: Soter - Sotero.

16. Nomoj je -o.

A. Dombrovski proponis por tiu ĉi grupo (E.K. 1905, 31): „La nomoj latinaj aŭ grekaj finiĝantaj en nominativo per -o estas enkondukindaj en nian lingvon senŝanĝe, ekz.: Apoll'o, Leo, Brun'o Saf'o, Cicero, k.c., ĉar ili jam havas esperantan finiĝon -o”.

Tamen tiu -o ne estas finaĵo, sed parto de la radiko! Tiel montriĝas el la latina genitivo: Leo Leonis.

Tial ni ankaŭ trovas la formon Leono, ekz. de la frato de Zamenhof.

La tri Lingva Komitatanoj ankaŭ proponis: Cicerono (219), Leono, -ino (224), Nerono (225), Zenono (228). Tamen flanke de tiuj: Bruno (M.S.) (219), Hugo (222), Ivo (222), Otto (225).

K. Kalocsay (Dante, Infero) sur p. 54 donas: Platono, Zenono, Cicero. K. Kalocsay - G. Waringhien (Plena Gramatiko de Esperanto) tamen: Cicerono (p. 144).

Ankaŭ la traduko de S. Kropotkin, Etiko I havas: Zenono (173), Cicerono (175), Nerono (176), Platono (176).

Se iu ŝatas la regulan derivon, li do povas ĉiam aldoni -no:

Bavo	Bruno	Hugo	Leo	Otto	Trudo	Wiro
Bavono	Brunono	Hugono	Leono	Otono	Trudono	Virino

17. Aliaj nomoj.

Nur kelkaj nomoj de Sanktuloj ne apartenas en la antaŭaj grupoj:

Beda	Ephraem	Joachim	Joseph	Menna	Sennen
Bedo	Efremo	Joakimo	Jozefo	Meno	Seneno

H. G. Wannemakers. S.J.

RECENZOJ.

Nederlando, („Miraklo el Akvo”), formato 31,5 x 22 cm, kun + 175 tutpaĝaj ilustraĵoj en rotogravuro kaj 16 koloraj bildoj. Eld. W. van Hoeve N.V., Hago, Ned. La ĵurnalisto Mag. E. Elias kaj la fotografisto Ed. van Wijk kompilis ĉi tiun belegan verkon kiu donas bonegan impreson pri la nederlandaj urboj, pejzaĝoj, homoj, artoj, folkloro, unuvorte, pri la nederlanda sfero. La grandaj fotoj estas mirinde belaj kaj la tuto estas fortike bindita en luksa tolbindo kun ora stampo kaj multkolora plastika kovrilo. La senriproĉan tradukoŝ de la teksto prizorgis s-ino Julia Isbrucker. La prezo (27,50 ned.guld. + afranko: por Ned. f 0,60, por aliaj landoj f 1,25) eble fortimigas multajn, sed pripensu, ke la verko estos ornamo de la libroŝranko kaj fonto da ĝuo dum multaj jaroj, kaj estas ja vere ke oni ofte elspezas tian sumon en unu gaja vespero! Ni varme rekomendas la vere apartan verkon, kiu ankaŭ bonege taŭgas kiel valora donaco kaj cetere estas havebla kun angla, franca, germana, hispana kaj nederlanda tekstoj. — T.D. *

Aperajoj en Banneux, de Armand Geradin. La interesa raporto pri la aperoj de la sankta Virgulino en 1933 al la knabino Mariette Beco en la nun jam fama belga pilgrimejo, estas jam tradukita en multajn lingvojn kaj nun ankaŭ en Esperanton. Estas bonaspekta, 28-paĝa multobligita kajero + kovrilo, sed ni tre bedaŭras ke la tradukinto ne korektigis la tekston de kompetenta persono, ĉar ne nur abundas la prezeraroj (aldonita listo mencias nur proks. la trionon kaj eĉ enhavas novajn!) sed ankaŭ la lingvaj malperfektaĵoj. La enhavo tamen restas interesa kaj la kajero estas senpage havebla ĉe Rev. Frato Arni Decorte, Stropstr. 127, GENT, Belgujo. — T.D. *

Pilgrimejoj de la ĉefdiocezo Salzburg, Aŭstrio kore invitas vin al vizito! 8-paĝa ilustr. bonstila broŝuro priskribas diversajn pilgrimejojn. En antaŭparolo la ĉefepiskopo Andreas Rohrer substrekas la valoron de Esperanto speciale por katolikoj. Eldonis en kunlaboro kun s-ano Hugo Steiner de IEMW, Wien: Grupo de AKLE (IKUE) „ESTONTECO”, Kapitelplatz 2, SALZBURG, Aŭstrio, ĉe kiu ĝi estas havebla por 1 respondkupono. — T.D. *

Esperanto, la dua lingvo por ĉiu. Dulingva (germana kaj esperanta) bonaspekta, flustila, 44-paĝa broŝuro + kovrilo, kiu en 12 ĉapitroj priskribas la mondlingvan demandon antaŭ la Ligo de Nacioj, la priskribon al UNO kaj UNESKO, la lingvoproblemon ĉe UNESKO, la utilon, la instruadon, la literaturon, la praktikan uzadon de Esperanto, ktp. Eldonis: Internacia Esperanto-Muzeo, WIEN I, Hofburg, Aŭstrio, kie ĝi estas havebla por 2 respondkuponoj. — T.D. *

D-ro F.W.A. Korff, ...**Kaj tamen Dio estas Amo**. Esperantigis W.Versteeg-Graftdijk. Eldonis: J.N.Voorhoeve, Den Haag, Nederlando, (1954), 29 p., prezo ne indik.

El nederlanda originalo de la sama eldonisto aperis en belaspekta libreto ĉi tiu konsidero pri la temo: Dio estas Amo. La ekspliko estas klara, aktuala kaj konvinka por homoj de nia tempo.

Multaj frazoj estas trafaj: „Ĉio, kion oni povas alporti por refuti la certecon, ke Dio estas Amo, ne estas laboro de Dio, sed . . . de homoj!” p. 7 „Ĉar Dio estas amo, tiel restas sen Dio . . . nur infero.” p. 11 Prave: „la analogio al homa amo povas nin instrui”, ke Dio estas amo. p. 15.

Kelkloke montriĝas diferenco inter la protestanta kaj la katolika doktrinoj, ekz.: „Simboloj de Dieco en tiu ĉi mondo estas ĝis nun: pano, kiu estas rompata kaj vino, kiu estas verŝata, memore al la korpo kaj al sango de Jesuo Kristo” p.24. Ni dirus: „Simboloj de Dieco en tiu ĉi mondo estas ĝis nun: la Korpo, sub panŝajno rompata, kaj la Sango, sub vinŝajno verŝata, memore al la morto de Jesuo Kristo”.

H.G.W. *